

& Balado pri brigo Blua Birdo el Hull:

< Rekante 31 el 61 batoj por strofo, entute 671 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4480. Verkis Evert Taube (1929). El sveda tradukis Martin Strid (2010) kaj per disdivido de strofoj donis en la melodio lokon por nova rekantaĵo (2016). Tiu ŝipo vere ekzistis sed ne pereis. Klarigoj (*): '1 Hull, urbo je angla orienta marbordo. ; Soten, fjorda golfo je sveda okcidenta insularo. ; Antaŭkristnaska tago de jaro 1872. '2 Stiriston oni povas ŝnure fiksi al rudro por ke forta ŝtormo ne forlavu lin de ferdeko. ; Smögen, insulo kaj vilaĝo en Bohuslän. '3 Hållö, insulo kun lumturo. ; Middlesborough, angla havenurbo. '4 Anoj de pereanta ŝipo lumigas torĉojn por alvoki helpon. '6 Savboato alproksimiĝu de malventa flanko por ne frakasiĝi kontraŭ pereanta ŝipo. ; Vokis per forta ĝoja voĉo. '7 Metafore pri vizaĝaj trajtoj kaj vidkapablo.>

(#Melodio:

<1,4:61> (

LaTi /do dodo do redo do3lTi TiLa Ti; LaTi do dore do TiLa La a; LaTi do Tido re dore mi rimi fa;
SoSo fa fafa mi lriri mi i;

(#Rekantaĵe: fami re doTi do TiLa Ti TiTi Ti; fami re fami re riri mi i; dore mi mire do remi fa3mi
fari mi; LaTi do dore do TiLa La a h))×11)+

(&Strofoj:

'1 Estis /Blubird' el Hull*, estis Blu2birdo, brig', ; kun brajlitaj topveloj en sku' ; neĝoŝtorma ĉe Suten* kun glacia rig' ; julvespere en se2pdek du*.

(×: **Hurlas vento kaj muĝas la maro en ŝtorm' ; Frapas ondoj sur ŝipo kaj ŝer' ; Paŝu plankon endome sekure en la ĉen' ; Hurlas vento kaj muĝas la mar'.**)

'2 – Ŝnuru l' svedon al rudro*, li scias je bras' ; vokis ŝipestro, – Nova deĵor'! ; kaj Karl Stranne el Smegen* ŝnuriĝis al rudr' ; de Blubird', pereonta for.

'3 Glimis Holoj-lumturo* tra bli2ndŝprucoj lin ; de ventflanko tra densa neĝpluv' ; kaj en malvento Smegen, kun hejmo, patrin' ; novleter' lia de Midelsbru*.

'4 – Nu, ĉu, Karl, preteriros ŝi jen? -Ne, ŝipes;tro, ni torĉu*, finiĝis vojaĝ' ; Estas Holoj triborde, ondrompo en malvent', ; – Ĵetu ankrojn! Boatojn al naĝ'!

'5 Sed ŝi ne staris plu. Pretigi2tan boat;on ondrompoj forprenis al mar' . ; – Kredas mi, diris Karlo, eliris jam pat;ro renkonte, mi fidas al patr'.

'6 – Jen boato malvente*, 'stas patro – Ni jen! ; Patro mia el Smegen! Ha lo! ; – Jen boato, li kantis*, jen ili, saltu en, ; ĉiuj viroj, li savos nin do!

'7 Estis aglo*, vikingo, la Stra2nne-aĝul' ; julvespere en sepdek du, ; prenis brandon distilan el ŝrank' en angul' ; ŝiprompitojn oferti je ĝu'.

'8 – Kiu nomo de l' ŝipo? demandis li dum ; drinkojn verŝis en pintglasojn naŭ. ; – Brigo Blubirdo – prenis li dekan glason, bum! ; Ĝin frakasis al planko kun plaŭd'!

'9 – Ĉu Blubirdo, ŝipestro, Blubi2rdo el Hull? ; Dio, kie 'stas do mia fil'? ; Kie l' knabo, ŝipestro, pro nia savul'! ; Mortsilentis sur benk' ĉiu vir'.

'10 Ŝtormĉapelon deprenis nun la2nte l' aĝul' ; – Ŝparu panjon, ŝipestro, ĉi nokt'e. Ne nomu la brigon en mara profund', ; ne Blubirdon eĉ diru per vort'!

'11 Kaj ŝipestro ekstaris, jam griza magrant', ; ŝtormo hurlis, de lia2j lip;oj apenaŭ aŭdeblis tremvoĉ' al gastigant': ; – Karl ŝnurit' forgesiĝis sur ŝip'!